

ĈASANTE HISTORION DE PLANLINGVOJ...

Ĉu vi scias, ke la plej mondonema unuopula subtenanto de Esperanto estis s-ino Alice VANDERBILT MORRIS, ĉefa subtenanto de *Interlingua*? Aŭ, ke s-ro TOBLER, la entreprenisto kiu lanĉis surmerkate la mondfaman ĉokoladon Toblerone, estis idisto? Legante la imponan volumon (pli ol mil paĝoj, dukolumnaj!) vi povas ekscii kuriozaĵojn kaj pli seriozajn informojn pri grava lando de la verda historio, precipe – sed ne nure – en la komenco de la pasinta jarcento. Interlingvistoj kaj esperantologoj aparte ĝuos la legadon, aŭ – pli bone dirite – la ĉasadon de informoj.

Fakte, informoj estas multaj kaj verdire ne tro facile retroveblaj: sed, se oni sin engaĝiĝas aventure, la enaj trezoroj rekompencos la ĉasiston.

Mi parolis pri interlingvistoj ĉar la volumo traktas en apartaj sekcioj Volapukon, Esperanton, *Occidental-Interlingue* kaj *Interlingua*

de IALA. Kiel? Ĉefe per raraĵoj: signifaj dokumentoj de la ĉefrolantoj en la originalaj (plan)lingvoj, ĉiam enkondukitaj de esperanta resumo, kaj krome per vivpriskriboj de homoj kaj priskriboj de konceptoj kaj lokoj.

Temas pri enciklopedio, ĉu ne? Ekzemple, multa spaco dediĉitis al Hector HODLER, kaj mi aparte gustumis la biografiojn de svisaj pioniroj kaj posteuloj. Kaj tio validas ankaŭ por gravaj homoj preskaŭ savitaj de porĉiama forgesado en polvokovrita biblioteko. Aparte mi volas menci Ric BERGER-on, pioniron kiu transiris de Esperanto al Ido ĝis *Occidental* kaj fine *Interlingua*, kies rimarkoj – purigitaj de ia pikemo pro la historiaj cirkonstancoj kiam planlingvaj subtenantoj batalis inter si – nepre legindas.

Scivolantoj estu avertitaj: leganto devas almenaŭ legipovi, krom Esperanto, la ĉefajn svisajn lingvojn (germana, franca, itala) por aprezi multajn originalajn dokumentojn. Krome, enspuras tekstoj en la angla, romanĉa, kaj en multaj efemeraj planlingvoj, ĉefe esperantidoj kaj planlatinidoj, ankaŭ savitaj de porĉiama forgesado.

Aparte menciindas stenografia propono. Amuzis min la teksto en Eŭropanto de MARRANI, ludcela planlingvo kiu havis iun fortunon en Svisujo. Ĉiuokaze, la plej granda parto de la enciklopedio estas dediĉita al la svisa esperanto-movado, ĉar tutsimple ĝi pli gravas ol la aliaj, kvante kaj kvalite.

Finas vortaro esperanta-franca-germana – laŭ mi ne tre utila, ĉar sen legipovo de la esperanta, la libro estas duone ĝuebla – kaj kronologio, bibliografio, kaj nomindekso, kiuj povas esti uzataj kiel eklanĉiloj en la informoĉasado.

Federico Gobbo

La Gazeto - Libroservo

12 sous la Ville, FR-55210 Creuë, gazeto@aol.com

Kara Leganto,

Se vi ne scias kion legi, petu nian libroliston. Vi mendas, ni sendas, vi pagos poste.

Ni ankaŭ havas en stoko **librojn el la jaroj 1900-1950**. Se pionira libro, aŭ io aparta, interesas vin, skribu al ni...